

Kunsido de la Federacia Komitato la 6an de februaro 2016

Sabaton la 17an de januaro 2015 je la 15a00 kunsidas la Federacia Komitato de la Nordfrancia Esperanto-Federacio en Lambersart (domo de Katja Boen).

Ĉeestas (13): Katja Boen, ĝenerala sekretariino; Daniel Calvos; Michel Dechy, prezidanto; Xavier Dewidehem; Roch Jullien; Claude Longue-Épée; Joëlle Muller; Arlette Plutniak; Edmond Plutniak; France Valet; Richard Valet; Xavier Vilain, kasisto; Didje.

Senkulpiĝis (5): Thérèse Dequidt; Jean Dietrich; Cyrille Découture; Catherine Lévêque; Jacky Ramon; Didier Touller.

Prezidas: Michel Dechy. Protokolas: Xavier Dewidehem.

Universala Kongreso “Lille2015” kaj Internacia Infan- Kongreseto

Xavier Dewidehem raportas, ke la 100a Universala Kongreso estis tre sukcesa. Ĝin partoprenis 2700 homoj el 80 landoj. Abundis la programo spektakle, ekskurse, ktp. Elstaris la aranĝo en Bulonjo-ĉe-Mar, kie urbestro Frédéric Cuvillier brile akceptis la kongresanaron. La 100a UK estis malfermita: estis multa komunikado kaj multaj afiŝoj tra la urbo; okazis spektakloj sur urbocentra placo, en Gare Saint-Sauveur kaj en Lille-Plage; partoprenis 130 homoj en la publikaj kursoj “Esperanto Eksprese” en la kongresejo. La malfermeco de ĉi tiu UK inspiris la postajn.

Michel Dechy aldiras, ke dank’ al Arlette kaj Edmond Plutniak memorŝildo pri Gaston Waringhien estis inaŭgurita ĉe placo Philippe-Lebon en Lillo. Tre dankinda estas la LKK kaj Julia Hédoux.

Michel Dechy organizis la Internacian Infanan Kongreseton en Villeneuve-d’Ascq. Lin multe helpis Fabrice Lemaire, (kuirintino), Valère Dumont. En ĝi partoprenis 45 junuloj el 10 landoj.

Edmond Plutniak sugestas al la lillanoj informi la restoracion ĉe la placo Philippe-Lebon pri la esperantistaj aranĝoj.

Federacia jarkunveno en 2016

Okaze de la ĉi-jara federacia jarkunveno la membraro renovigu la tutan Federacian Komitaton, kiu tiutage tuj elektu novan Estraron.

La klubo Arras-Espéranto organizos la federacian jarkunvenon en dimanĉo la 1a de majo: matene okazos la jarkunveno; posttagmeze okazos vizito de la Libra Salono kun budo pri Esperanto.

Nova kasisto

Xavier Vilain decidis ne plu esti kasisto de post la venonta jarkunveno. Daniel bonvolas tiam fariĝi nova kasisto. De nun ambaŭ laboros kune pri financo.

Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage

Roch Jullien organizos la venontan Eŭropan Rendevuon en Stella-Plage dum la 19a kaj 20a de novembro. Ĉirkaŭ Roch ekstaris helpskipo el 7 membroj de Arras-Espéranto.

Roch volas iom renovigi la aranĝon, ekzemple: ebligi partopreni ekster la atelieroj; komencigi la dimanĉan programon malpli frue; diversigi la dimanĉan posttagmezon cele al la komencantoj. La atelierojn gvidos: (1) Katalin Kovats; (2) Michel Dechy; (3) Anne Jausions; (4) Arlette Plutniak. Koncertos JoMo.

La Eŭropan Rendevuon la Federacio oficiale organizas kaj finance responsas kun la helpo de Arras-Espéranto.

La Federacio monhelpos ĝis po 50 € partoprenontojn, kiuj bezonos tian helpon laŭ la indikoj de la kluboj. Tiun federacian monhelpon ne reklamos la oficialaj informiloj kaj aliĝilo, sed informos la kluboj al siaj membroj kaj lernantoj.

Ekzamensesioj

La Federacio organizos FEI-ekzamensesion kun la unua kaj dua gradoj en sabato la 18a aŭ la 25a de junio en Lillo (MRES).

La Federacio ne organizos KER-ekzamensesion en 2016. Sed eble ĝi povos okazi en la Eŭropa Rendevuo.

Diversaĵoj

Michel Dechy informas, ke UFE proponas sendi po 10 ekzemplerojn de *Le Monde de l'espéranto* al homoj, kiuj pretos disdoni ilin.

Michel Dechy indikas, ke la Federacio iel helpu al UFE por relanĉi la UFE-membrojn por reaniĝi.

Michel Dechy proponas, ke la Federacio ĉi-jare subvenciu la retejon Edukado.net je pli poste decidota sumo.